

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

ARTISTA VIVO

Johano Peniko sin dediĉas al pentrarto. Li legis en la ĵurnaloj, ke en tiu ĉi jaro okazos ekspozicio, kaj li, nature, volas partopreni ĝin, malgraŭ tio, ke lia decido eble malgrandigos la nombron de liaj amikoj...

Johano finverkis sian pentraĵon; vidiĝas sur lia vizaĝo plenkontenteco. Oni parolas al li pri *Rafael* — li nur ridetaĉas; pri *Rubens* — kaj li reridetaĉas; iu kuraĝas nomi *l'Espanyolet* — « fi! » diras li; kaj pri *Vinci* kaj lia fama *Joconde* li eĉ ne volas aŭdi, nek ĝin vidi...

Peniko prilaboris sian pentraĵon en la plej sekreta sekreto. Li timis, ke oni forŝtelos lian ideon. Sed, finita jam la pentraĵo, li invitas siajn intimajn amikojn, por ke ili vidu la verkon, antaŭ ol ĝin ekspozicii.

La amikoj estas en la pentrejo. Salutoj, afablaĵoj, babiladetoj, cigaredoj, k. t. p., k. t. p. Oni ekzamenas la pentraĵon:

Peniko. — He! kion vi opinias?

Amiko 1-a. — Tre bone! Superbone, eĉ!

Amiko 2-a. — Perfektege!

Amiko 1-a. — Tre lerte kunmetita... kaj super ĉio la ideo estas tute trafa.

Amiko 2-a. — Kaj nova. Kie vi inspiriĝis?

Peniko. — Ho, estas tre kurioza afero. Mi ĝin rakontos al vi. Jen: Kelkajn tagojn antaŭ Kristnasko, mi veturis en la urbon Chartres, kaj de la fenestro de l' vagono mi ekvidis ĝardeneton, en kiu kuris du knabetoj, persekutataj de hundo. La afero allogis min kaj... la sekvantan tagon mi prenis miajn ilojn... kaj jen ĝi estas.

Amiko 1-a. — Estas vere interesa. Ne dubu pri ĝia

akcepto... kaj precipe se vi plibonigos unu aferon. Ĉu vi ne koleros ?

Peniko. — Senĝene vi povas paroli.

Amiko 1-a. — Nu, jen, amiko : se mi estus vi, mi aldonus sur la ĉielon kelkajn nubojn. Tio de l'bluaj ĉieloĵ sennubaj estas ja tro malnova...

Amiko 2-a (prenante parolon). — Kaj laŭ mia opinio, mi ne prezentus la infanojn tiel ĝojaj...

Peniko. — Ĉu vi opinias ?

Amiko 1-a. — Jes, nia amiko estas prava.

Amiko 2-a. — Aŭ ĉiuokaze, mi pentrus unu ridanta kaj la alian timigita. Tiamaniere ĉiu estos kontenta.

Peniko (ekdubante). — Jes, jes... ne malbone... Estos du efektoj...

Amiko 2-a. — Kaj poste, permesu, la hundo, anstataŭ esti *Terranova*, mi ĝin farus *safara*...

Amiko 1-a. — Ha ! jen bela ideo : por plivivoplenigi la pentraĵon, mi pravigus la timon de l'etuloj.

Peniko. — Jam estas : ja hundo persekutas ilin.

Amiko 1-a. — Tio ne sufiĉas por pravigi la timegon.

Peniko. — Do, mi ja ne scias kion fari !

Amiko 2-a. — Ion tre simplan, amiko... jen : bruligu la domon de l'fundo...

Peniko. — Ĉu vere ?

Amiko 1-a. — Ho, jes, amiko. Bruligu ĝin kaj tiam pravigata estos la timego de la knaboj, de l'hundo...

Amiko 2-a. — ... kaj de la farmuloj de l'domo, figuroj kiujn mi aldonus... Pentru fumon tre riskan, — fumon nek verdan, nek bluan, se povas esti...

Peniko (plene konvinkita). — Jes, efektive ; la ideo ja plaĉas al mi ; sed se mi bruligas la pentraĵ... pardonu, mi volas diri la domon, mi devas forstreki la arbojn.

Amiko 1-a. — Tio neniel malhelpas. Forstreku ilin, kiel mi forstrekus ankaŭ unu el la du infanoj.

Peniko. — Ĉu vi kredas ?

Amiko 1-a. — Jes, serioze, amiko, jes. (Subite) Ha, ĉu vi scias, kion mi farus, se mi estus vi ?

Peniko. — Kion ?

Amiko 1-a. — Rigardu, mi forstrekus la domon, la arbojn, la hundon, unu el la du infanoj, kaj restigus solan infanon pli terurigitan, kaj post li, mi pentrus leonon.

Amiko 2-a. — Diablo! kia bela ideo!

Peniko. — Sed pri la brulanta domo...?

Amiko 1-a. — Ho, vi certe trovos solvon pri ĝi... vi estas tiel talenta! vi ne bezonas konsilon... La flamoj terurige ruĝigus la ĉielon, kaj tial, ke la ĉielo estas ruĝa, ĉiu komprenos tuj, ke la sceno okazas en la dezertego Sahara.

Peniko. — Sed, kun infano tiel vestita!

Amiko 2-a. — Senvestigu lin.

Amiko 1-a. — Aŭ vestigu lin laŭ maŭra kostumo.

Amiko 2-a. — Jes, estus multe pli bone...

Amiko 1-a. — ... aŭ igu lin monaĥo.

Amiko 2-a. — Pentru al li blankan barbon... Igu lin maljuna, tre maljuna.


Amiko 1-a. — Aŭ alia afero: ke la knabo estu nigrulo... kun blankaj haroj... Vi vidos, kiel bonege ĝi aspektos!... Ni al vi konsilas tion, tute sincere, kiel bonaj amikoj.

*
*
*

La amikoj foriris. La sekvantan tagon Johano Peniko estis vizitata de aliaj intimaj amikoj, ne malpli inteligentaj kaj kompetentaj pri pentrarto, ol la unuaj. Postsekvantan tagon de aliaj amikoj... Ĉiuj eldiras sincere opiniojn. La pentraĵo estas vere artista, mirinde bela, grandioza, sensacia... sed, estus bone, fari malgrandan ŝanĝon... nur malgrandan, bagatelan... pri la temo. Unuj konsilas al li, ke li transformu la pentraĵon, — per kelkaj facilaj peniktraĵoj, kompreneble! — kaj ke ĝia temo estu la *Sepa Kongreso Esperantista*; aliaj la *Superakvego de la Seine*, aŭ *Surpriĝitaj fokoj*; kelkaj la *Mortpaŝo de Ferrer*; unuj *Krokodilĉasado sur la Nilo*, aliaj *La Ĉefpreĝejo de Chartres*, aŭ *Nokta ŝippereo*, aŭ *Kronado de la reĝo Karlo I-a*, aŭ eble *Petolado de ebriaj vilaĝanoj*, eĉ *La presejo de «Juna Esperantisto»*....

... Post du semajnoj, estante montradinta la pentraĵon al «bonvolaj, sinceraj» amikoj, Johano Peniko eniris nevole en la frenezulejon...

JOSEFO SOLSONA.



LA MALGRANDAJ BRUNAJ HOMOJ

Ferakonto, adaptita de FRANK MUNDELL.

Fino. (Vidu la komencon en nia antaŭa numero.)

En la ĝardenon ili iris. Ĝi pli ĉarmegis Anĉjon, ol io, kion li antaŭe vidis. Ĉirkaŭis ĝin latisbarilo el interplektitaj oraj kaj arĝentaj fadenoj. Troviĝis multe da belaj florbetoj tiaj, kiaj ne troviĝas en ordinaraj ĝardenoj, kaj arboj fleksiĝantaj sub la pezo de strangaj fruktoj. La vojetoj estis pavimitaj ne per ŝtonetaĵo, sed per granitaj kaj marmoraj kahelegoj.

Sur unu el la vojetoj ludis granda nombro el la malgrandaj brunaj homoj. Kiam ili ekvidis Anĉjon, ili ĉesigis la ludon kaj kuris renkonte al li akklamante: « Bonvenu, Anĉjo! » Ili deŝiris fruktojn kaj donis al li, kaj Anĉjo ilin manĝis kaj trovis tre bon-gustaj.

Anĉjo kaj la malgrandaj brunaj homoj kune ludis kelkan tempon, kaj tiam iu diris: « Rapidu, ni konduku nian amikon al la nuksarboj ». Tiam ĉiuj transkuris al la alia flanko de la ĝardeno, kie staris longa vico da arboj, brilantaj per oraj kaj arĝentaj nuksoj. Ili prenis longajn bastonojn kaj debatis nuksojn de sur la branĉoj: ili donis bastonon al Anĉjo, por ke li ankaŭ debatu nuksojn. Debatinte grandan nombron, ili ronde sidigis, dividis la nuksojn kaj donis porcion al Anĉjo.

Tiam unu el la malgrandaj brunaj homoj prenis dikan diamantan kudrilon, traboris la nuksojn de Anĉjo, kaj tratruigis bluan silkan ŝnureton. En la daŭro de kelkaj minutoj li faris tre belan kolrington kaj ĝin metis ĉirkaŭ la ŝultrojn de Anĉjo. Por doni al vi ideon pri la longo, mi povas diri, ke ĝi estis tiel longa, ke ĝi etendiĝis ĝis liaj genuoj.

Tiam diris la malgranda bruna viro: « Jam estas tempo, ke vi iru hejmen, ĉar viaj gepatroj maltrankviliĝos pri vi. Jen estas dolĉa oranĝo por via patrino kaj granato por via patro. Diru al li, ke li zorge ĝin malfermu. Li scios uzi tion, kion li trovos interne. Diru al li, ke ni sendis al li tion por pagi la griaĵon, kiun vi nepermesite donis al ni el lia provizejo. Diru ankaŭ, ke ni sendis ĝin pro vi ».

Anĉjo demandis, ĉu li povas proprigi al si la kolrington, kiun ili donis al li. La malgranda bruna homo respondis, ke ili donacis ĝin al li, por ke li faru kun ĝi kion li volas. Tio tre plaĉis al la knabo, ĉar li jam decidis donaci ĝin al sia patro, por ke ĉi tiu rekonstruu la muelejon.

Tiam Anĉjo diris adiaŭ al siaj bonkoraj amikoj, kaj la malgranda bruna homo kondukis lin returne sur la vojo, sur kiu li

venis. Kiam ili proksimiĝis al la enirejo, lia kondukanto diris : « Mi jam devas diri adiaŭ, ĉar estas malpermesite al mi iri pluen. Kuŝiĝu sur la mola musko ĉe la piedo de la arbo kaj ripozu, ĉar vi iris pli malproksimen, ol vi imagas. Se vi ne ripozos kelkan tempon, vi estos tre malforta kaj laca por atingi vian hejmon hodiaŭ nokte. »

V. — La sola rimedo por esti feliĉa.

Kiam Anĉjo eliris en la liberan aeron, li sentis sin tiel laca, ke li ĝoje kuŝiĝis sur la musko, kie li ekdormis antaŭ ol eniris la kavernon. Kiel antaŭe, li profunde dormis. Kiam li vekigis, la suno estis subiranta. Li frotis al si la okulojn, kiel ofte faras homoj vekigantaj el longa dormo ; li vidis, ke la kaproj proksime paŝtigas, kaj ekpensis, ke lia vizito en la kaverno estis nur sonĝo. Li salte stariĝis kaj pelis la kaprojn hejmen kiel eble plej rapide, por ke li alvenu tien antaŭ ol mallumiĝos.

Lia patrino estis sopiranta sian knabeton.

— Kial vi restis tiel longan tempon? — ŝi demandis. — Ni serĉis vin ĉie en la daŭro de la tri lastaj tagoj, kaj estis en granda malĝojo, ĉar ni timis, ke ia malbono okazis al vi.

— Mi nur iris, — respondis Anĉjo, — al la fonto apud la kverko hodiaŭ posttagmeze, kaj tie mi dormis mallongan tempon ; tio estas ĉio. Kial vi parolas pri tri tagoj?

— Ne, ne, infano! — ŝi diris, — tio ja ne estas vero. La patro vin serĉis ĉe la fonto en la unua tago, kaj vi ne estis tie. De tiam li faris nenion alian, ol vagadis ĉien sur la montetoj, serĉante vin. Li ankoraŭ forestas por serĉi vin, kvankam li jam ne esperas vin retrovi. Diru, kia estas la fajrerjeta aĵo pendanta ĉirkaŭ via kolo. Venu pli proksimen, kaj lasu al mi ĝin vidi.

En tiu momento eniris la patro. « Ho, Anĉjo! — li ekkriis. — kien vi iris? Mi pensis, ke ni vin perdis. »

Anĉjo rigardis siajn gepatrojn, poste la kolrington, kiun ĝis tiu momento li tute forgesis.

— Ĉu do ne estis sonĝo? — li ekkriis. — Mi efektive estis ĉe la malgrandaj brunaj homoj, en ilia domo, en ilia ĝardeno? Jen, ĉi tiuj oraj kaj arĝentaj nuksoj kreskis sur la arboj, — kaj li ilin eltiris el sia poŝo. — La malgrandaj brunaj homoj sendis donacojn al vi ankaŭ. Jen, ĉi tio estas por vi, patro. Oni nomas ĝin granato. Ili diris, ke vi devos zorge malfermi ĝin, kaj ke vi scios kian uzon fari el ĝi. Jen ĉi tiu dolĉa oranĝo estas por vi, patrino mia.

Tion dirante, li enmanigis al siaj gepatroj la donacojn de la malgrandaj brunaj homoj.

La patrino prenis la oranĝon, ĝin manĝis, kaj diris, ke neniam antaŭe ŝi gustumis ion tiel dolĉan. « Certe estis io bona

en ĝi, — ŝi diris, — ĉar mi komencas senti min pli sana, ol jam de longe. Estu benataj la malgrandaj brunaj homoj ! »

La patro prenis la granaton kaj suspekto rigardis ĝin. « Kie sin trovas la malgrandaj brunaj homoj, pri kiuj vi parolas ? » — li demandis Anĉjon.

— Ĉu vi ne memoras, patro ? Unu tagon, en la somero, malgranda bruna homo venis al la muelejo kaj petis, ke vi donacu al li iom da griaĵo en saketon ? Vi ne volis donaci al li kaj forpelis lin ; sed mi lin tiel kompatis, ke mi plenigis lian saketon per la plej bona griaĵo, en la provizejo.

— Ĉu tio estas la homo, kiu sendis al mi donacon ? — demandis la muelisto, preskaŭ lasante fali la frukton el siaj manoj pro mirego. — Kion fari el ĝi ? Eble troviĝas interne io, kio malutilos al mi.

— Ne, patro, — diris Anĉjo, — ne timu. Ili estas tro bonkoraj por fari tian trompon. Ili sendis la granaton por pagi la griaĵon, kiun ili ricevis el via provizejo. Malfermu ĝin, mi petas, por ke ni vidu, kio estas interne.

— Jes, faru tion, — diris la patrino. — Mi aŭdis, ke donacoj de la malgrandaj brunaj homoj ĉiam alportas bonan ŝancon.

— Nu, do, — diris la muelisto, — mi malfermos ĝin.

Li rompis la ŝelon de la frukto, kaj jen ! elruliĝis — ne la beletaj ruĝetaj semoj, kiujn li atendis, sed brilantaj diamantoj.

— Altvaloraj ŝtonoj ! — li kriis. — Mi povos vendi ilin por granda sumo da mono, kaj rekonstrui la muelejon.

Frue la sekvintan matenon la muelisto ekiris al la urbo. Vespere li revenis kun ŝarĝveturilo tirata de tri ĉevaloj kaj ŝarĝita per mebloj, nutraĵo kaj ĉio necesa por fari hejmon komfortan. Sur la fundo de la ŝarĝveturilo estis tri grandaj kestoj plenaj de ormoneroj. Tio estis la mono, kiun li ricevis el la vendo de la diamantoj.

La muelisto rekonstruis la muelejon pli granda, pli bona, ol ĝi estis antaŭe, kaj post unu jaro ĝi ree komencis mueli la grenon en farunon. La bieno estis provizita per ĉevaloj, bovinoj kaj ŝafoj, kaj la kortbirdejo kaj la ĝardeno estis en bona ordo kaj profitdonaj.

Homoj venadis de proksime kaj malproksime por mueligi sian grenon en la nova muelejo, kaj la muelisto denove estis feliĉa kaj bonstata homo ; sed li jam ne estis memservema kaj malmolkora. Neniu malriĉulo, kiu venis al lia pordo, jam nun foriris malplenmane, ĉar la muelisto jam ellernis unu el la plej gravaj lecionoj de la vivo : doni el la posedataj de li bonaĵoj al tiuj, kiuj havas nenion kaj bezonas helpon.



SIMPLA RAKONTO

De MAURICE MONTEGUT.

Kiam antaŭ ĉirkaŭ dudek jaroj mortis la lasta el la Prungey d'Hautresme, li lasis ankoraŭ junan vidvinon kaj dekjaran filon nomatan Georgo.

Ŝi loĝadis en la strato Servandoni, malgaja strato, en izolita domo. Ŝi tre ŝatis tiun loĝejon pro la iom vasta ĝardeno, en kiu la vicgrafo libere kreskis.

Ŝi devenis de malnova militista familio, kiu donis al Francujo kolonelojn kaj subgeneralojn. Ŝi vivadis sola, kiel eble plej bone edukante sian filon ĝis la tempo, kiam li siavice vestos sin per la uniformo kaj alkroĉos la batalglavon ĉe sia zonumo. Ĉar tiu patrino, kiu adoris sian solinfanon, ne volis pensi pri la danĝero de militista profesio; ŝi ne povis vidi lin en la estonteco alie ol sub la trajtoj de gloramanta oficiro.

Aliparte daŭrigis tiajn ŝiajn ideojn maljuna alitempa amiko, barono de Novaro, kiu al ŝi restis fidela.

Do, kvieta kaj amegata kreskis la vicgrafo. Sed la edukado mem, kiun li ricevis de sia patrino, kontraŭstaris al ŝiaj projektoj. Georgo ne volis esti soldato. Li lernis la leĝosciencon, ĉiutage vizitis la kvartalon de la Lernejoj; sed tiu patrino neniam rajtis plendi pri sia filo, kiu estis ja kiel lin deziris ŝia koro.

Forpasis du, tri jaroj sen gravaj okazaĵoj.

Iun matenon, la maljuna servistino tute malkviete eniris kaj sen enkondukaj vortoj kriis al sia mastrino:

— Ha! Sinjorino, strangan sciigon mi ĵus aŭdis. Laŭdire, lia Vicgrafa Moŝto baldaŭ edziĝos, kaj ni pri tio scias nenion.

Sinjorino de Prungey paliĝis, poste ploris, tre jaluza. Ŝi divenis, ke ŝia filo kaŝas al ŝi tiel gravan projekton, la kaŭzo estas, ke li timas ŝian opinion pri ĝi; li prokrastas tion ekdiri, ĉar li scias kiom li ŝin ĉagrenos; certe, iu malsamranga edziĝo kaŝe prepariĝas.

Al tiuj pensoj aldoniĝas alia maldolĉeco. Iu de ŝi prenis ŝian filon; ŝi jam ne havas lian tutan koron. Tamen ŝi preskaŭ fieriĝas, ke ŝia filo estas amata. Tio estis neevitebla, kompreneble: tiom ĉarma li estas. Kaj kun rideto ŝi konkludis:

— Tiu infanino scias elekti.

Tiu infanino! Tio estis la simbolo sub kiu ŝi konsideris ankoraŭ nekonatan, sed jam minacantan estulinon. Tiun saman vesperon mem, lojale kaj grave, demandis sian filon. Li tuj konfesis ĉion kun ia ĝojo, kvazaŭ tiu konfeso tre malpezigus lian koron. Jes, tio estas la vero. Li amas kaj estas amata. Vere ankaŭ estas, ke la junulino ne estas nobela, multe mankas por tio, sed ankaŭ ne riĉa, la malo eble naskus suspekton. Ne, tute ne riĉa.

— Mankus nur tio! — interrompis la patrino.

Li rediris: « Ŝi estas la filino de tre honestaj geburĝoj, kiuj eĉ timiĝas pro la honoro al ili farita. Lia patrino tuj konsentos por ke ĉiuj estu feliĉaj ». Li konkludis kisanterante ŝin:

— Kaj en tio vi nenion perdos, kredu tiel. Ŝi jam amegas vin.

Sed la maljuna sinjorino fariĝis severa. Edziĝi kun filino de geburĝoj, honesta, eble, sed terure nekonataj, tio estus rompo kun la tuta pasinteco; li devas rezigni tiun edziĝon.

Sed Georgo ŝin interrompis:

— Ne, patrino, mi ĝin ne rezignos; cetere, mi firme promesis. Mi vivadas por mi, ne por miaj prapatroj, kaj la tempoj ŝanĝiĝis. Mi edziĝos kun Ludovikino Durand, kiu estas bela kaj bona... Kaj se vi ne konsentos, mi bedaŭre....

— Sufiĉe! — interrompis la filino de l' bravuloj skandalita, incitita ankaŭ... — Sufiĉe! Mi konsentas, sed mi neniam allasos al mi Sinjorinon Durand d'Hautresme!

*
* *

Forpasis ankoraŭ tri jaroj. Georgo estis edziĝinta, sed Sinjorino de Prungey ĉiam rifuzis akcepti lian edzinon. Li revenis, li, ĉiun tagon dum unu horo, straton Servadoni, ĉar li amis sian patrinon sufiĉe, por pardoni tiun kormaldolĉecon faritan el antaŭjuĝoj.

Iun tagon, li forĝesis sian paperujon. Sinjorino de Prungey senintence malfermis ĝin kaj trovis en ĝi fotografajon, kiu altiris ŝian rigardon. Ŝi ĝin prenis kaj rigardis.

— Evidente, ĝi estas ŝi, murmuris la maljuna sinjorino,

iom emociita, kiel oni estas, kiam oni konsideras malamikon rekte en la vizaĝo.

Ŝi ekvidis dolĉafablan vizaĝon, vizaĝon de sindona amantino, kun mildaj okuloj, kun trajtoj tiel delikataj, ke ili ŝajnis malsanemaj; el la tuto devenis nedifinebla ĉarmo.

— Nu, ŝi estas almenaŭ beleta, — sopiris Sinjorino de Prungey... poste, post paŭzo:

— Kaj li? Kiel li estas?

Li, tio estas la filo de Georgo, la lasta el la Prungey d'Hautresme, malgraŭ la patrina nenobleco, alia Georgo nomata Johano. Unue, ĉe lia naskiĝo, ŝi deklaris, ke ŝi neniam konsentos vidi lin, nek aŭdi ion pri li. Sed de la unuaj monatoj pri li ŝi ĉiam pensis.

La morgaŭon, kiam barono de Novare permesis al ŝi diri: « Mi renkontis vian filon kun tiu intrigantino », — sinjorino de Prungey malafable respondis:

— Moderigu viajn esprimojn, mia kara. Tiu intrigantino, tiu intrigantino!... Kiel vi senĝene parolas!... Ŝi estas la tre inda filino de tre honestaj personoj... Kaj ŝi havas multajn bonajn ecojn!...

Poste ŝi haltis preskaŭ senspira, tiel same mirante kiel Sinjoro de Novare, kaj kriis levante la brakojn:

— Bona Dio! Ĉu vi min aŭdas? Mi defendas ilin. — Kaj ŝi etendis la manon al sia gravmiena amiko, kiu komprenis nenion plu.

Ŝi estis venkita. Ĉiu horo forportis iom da ŝia severeco. Ŝi pensis nur pri sia nepo. Li baldaŭ havos tri jarojn, la aĝon kiam vekigās la animo. Li ankoraŭ ne konas ŝin kaj li ŝin ne konos. Kial? Tial ke ŝi ne volas... Kiu?... Ŝi? Sensencaĵo. Ĉu ŝi tion diris? Kiam, kie? Ŝi estis freneza, tiam. Vidi lin, tio estas ŝia sola deziro... Kaj ŝi ne vidus lin!...

Ŝi sciis, ke ĉiujn ĉi somerajn posttagmezojn, lia patrino lin kondukas ĉe la « Luxembourg » (Luksemburgo); kaj tremante, iun lundon, ŝi trapasis la kradpordon, eniris la ĝardenon. Ŝin gvidis la memoro pri la fotografajo. Pasante, ŝi fikse rigardis ĉiujn junajn patrinojn sidantajn sub la plaĝanoj. Subite, ŝi vidis ŝin, en angulo, ĉe aparta flanko, sur la unua teraso, kun libro en la mano, sed ŝi ne legis; kaj la infano, ĉe ŝiaj piedoj, je maldika sablo plenigis sian ludsitelon.

SinJORINO de Prungey prenis seĝon, sidiĝis, firmigis siajn iom klarajn okulvitrojn, kaj lin rigardadis.

Li estas Georgo, tute Georgo en la sama aĝo... kun sama rigardo... sama hararo.... Kiel beleta li estas, Dio mia ! Kaj li estas mia ankaŭ, tiu ĉi ; kaj mi ne povas, kaj mi ne devas !... Ĝi estas gaja, la nobleco !... Ĝi estas gaja, la tradicio !...

SinJORINO de Prungey fariĝis kondukŝanĝema kaj malpli noblema.

De nun, ĉiujn tagojn, je la sama horo, ŝi sidiĝis sub la sama arbo, sur saman seĝon kaj dum horoj rigardis la infanon.

Kaj Johano fine konis ŝin. Al ŝi li ridetis, iafoje alproksimiĝis, etendante siajn manojn plenajn de sablo. Tiam ŝajnis al ŝi, ke la bona Dio malsupreniris surteren. Sed lia patrino vokis lin al si, timante ke li ĝenos la nekonatinton.

Ŝi ne tuŝis lin. Ŝi atente aŭskultis, kiam li siamaniere parolis ; kaj lia laŭta rido plenigis je volupto tutan ŝian estaĝon. Ŝi adoris lin. Ŝi alportis al li kukojn. Ili amikiĝis. La patrino, la intrigantino — ho ! tre milda — iom konfuza dankis. Tio daŭris dum monatoj. Sed Ludovikino parolis al Georgo pri la maljuna sinJORINO, kiu ĉiutage estis ĉe la Luksemburgo. Unue, li malmulte atentis pri tio, sed iun tagon penso trapasis lian kapon.

— Kiel ŝi estas, tiu maljuna sinJORINO ? — li demandis.

Ludovikino donis detalojn. Poste Georgo stariĝis, kisis sian filon, nenion dirante, sed pensis :

— Morgaŭ mi iros.

... Estis tre bele, tre varmete ; la Luksemburgo kantis per ĉiuj siaj birdoj, ridis per ĉiuj siaj infanoj. Ĝi estis juneca, feliĉoplena tago. Kiel ĉiam, ili tie estis, la du patrinoj, ĉiu sur sia seĝo, sub sia arbo, je kvin paŝoj unu de la alia, la infano inter ili, kriante vortojn al ili ambaŭ samtempe.

Kaj SinJORINO de Prungey rimarkis, ke Johano estas iom pala. Necese estus, ke li vivadu sur la kamparo, ŝi pensis, aŭ almenaŭ en la granda ĝardeno, ĉe la strato Servadoni, kie lia patro, ŝia filo, kreskis kiel floro de la tero, en la angulo de l' suno privilegiita.

Johano alpaŝis al SinJORINO de Prungey ; ŝi sin klinis

al li, premante lian dikan blondan kapon. Subite, iu starigis antaŭ ŝi, kaptis la knabeton je la mezo de l'korpo kaj metis lin en ŝiajn brakojn ; kaj dum ĉe la alia arbo la juna virino malkvietega sin apogis, kun tremantaj manoj, la avino aŭdis la voĉon de sia filo, sia Georgo, kiu diris al ŝi :

— Kapitulacu, patrino mia, kaptita estas via koro.

Esperantigis ROKSANO.

FOLIOJ PRINTEMPAJ EKFLORIS ...

Folioj printempaj ekfloris,
Kaj verda fariĝis la tero,
La freŝa aero odoris,
Allogis la milda vespero.

En homoj viviĝis la revo,
La penso forkuris espere,
Tra maroj ĝin portis la mevo,
Atakis la rokojn dangere.

Aperis la suno somera,
Diskreskis la bela naturo,
Eksonis la kanto ne-tera,
Kaj regis senlima plezuro.

La revo de homoj atingis
La celon de sia vojaĝo,
Nenio la ĉarmon estingis
Dum ĝia matura plenaĝo.

Sed baldaŭ alpaŝis aŭtuno,
Sur arboj ekvelkis folioj,
Malvarma fariĝis la suno,
Ekĝemis la fortaj tilioj.

Sur frunto de homa animo
Montriĝis sekreta doloro,
Al revoj aperis la limo,
Ekploris malĝoje la koro.

Kaj fine surŝutis la mondon
La neĝo malvarma, terura,
Kaj haltis sur maro la ondo,
Silentis la pulso natura.

Kaj falis la homa jam revo,
Kaj penson ne vekis la amo,
Ne portis tra maro ĝin mevo,
En koro ne vivis la flamo.

M. Kaus.

FELIETONO

Legendoj de la Litovaj Tataroj.

Kverko kaj fungo. — En densega arbaro, ĉe rivereto, estis kreskanta grandega kverko. Ĝi majeste muĝis dum vento kaj akraŝente dormetis dum bonvetero. Neniu arbo ĉirkaŭe egalas ĝin per riĉaĵo de la foliaro, per beleco de la trunko kaj per forto de la radikoj.

Unufoje matene, forskuinte de sur si silenton de la nokto, la kverko, je sia miro, rimarkis ĉe siaj radikoj ian kapeton, trapuŝigantan tra folioj de l'pasinta jaro. Ĝi estis fungo.

Rimarkinte, ke la reĝema kverko vekigis, la fungo kriis al

ĝi de malsupre : « He, kverko ! serĉu por vi novan lokon, alie mi elturnos vin kune kun la radikoj. »

— Se ĝi povis tiom elkreski dum unu nokto, — pensis la kverko, — kion oni povas ankoraŭ atendi de ĝi ?

Kaj ektimis la kverko kaj petegis :

— Kompatu, ho estimata ! donu al mi du-tri tagan prokraston, por ke mi elektu lokon.

La fungo konsentis atendi tri tagojn, dum la kverko serĉos por si novan lokon.

Pasis tri tagoj. La kverko ankoraŭ ne elektis lokon. Kaj ree ĝi petegis la fungon : « Kompatu ! donu ankoraŭ tri tagojn, por ke mi povu elekti lokon. »

Kaj la fungo respondis :

— Ne estas bezone. Restu sur via nuna loko.

Ĝia kapeto kliniĝis flanken ; ĝi tuta estis mordita de vermoj.

Homo kaj porko. — Kiam Alaĥo kreis la vivon kaj diversajn bestojn, Li sin turnis al la homo, la estonta ilia estro, kaj diris al li : « Vi, homo, estas kreita de mi kaj destinita por esti estro de ĉiuj bestoj. Vi ne obeos blinde la leĝojn de la naturo, sed vi vin gvidos per la menso, kiun mi donis al vi sufiĉege ; via animo estas nemezurebla, kiel oceano, sed se vi estos instigata al io malbona, Mi avertos vin, — por tio estas donita al vi la konscienco. Tamen se vi ne konsiliĝos kun la donitaj al vi gardantoj — la menso kaj la konscienco, — vi malsupreniros ĝis la plej malsupra ŝtupo kaj vi estos plej malbona el ĉiuj bestoj. »

Laste, la Kreinto sin turnis al la porko kaj diris : « Vi estas kreita de mi, por ekstermi malpuraĵojn. Vi estas senigita de la menso tiagrade, ke abelo superos vin per sia inteligenteco, vi estas senigita de mildeco kaj delikateco de kato, de fideleco de hundo, de fiereco kaj obeeco de ĉevalo, de diligenteco de multaj bestoj kaj eĉ de insektoj kaj vi estos enkorpiĝo de malpuraĵo, de spiritmallumeco kaj de maldiligenteco.

— Dank' al Alaĥo, la kreinto de la Universo, — diris la porko, — mi tamen estos pli bona, ol malbona homo.

El la rusa lingvo tradukis N. ŜVECOV.

PRI ESPERANTO

Nia forto — en espero,
La sukceso — en laboro.
Do, ni iru,
Kaj memoru :
Nur esperi, laborante,
Kaj labori, esperante !

Venke paŝas ni al celo,
Al ni brilas verda stelo.
For dubuloj,
Kontraŭuloj !
Sonu laŭte nia kanto :
« Vivu, vivu Esperanto ! »

J. VOLEVIĈ.

BIBLIOGRAFIO

La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

Kun plezuro ni dediĉas nian hodiaŭan bibliografian rubrikon al la librista Fırmo Fr. SEYBOLD, en *Ansbach* (Germanujo), Karlstrasse 10, kiu lastatempe tre gransignife riĉigis la bibliotekon de Esperanto.

Tre grava estas la verko **Albrecht Dürer**, *lia vivo kaj elekto el liaj verkoj*, kun klarigoj de la apartaj folioj; je komisiio de la « Instruista Unuiĝo por Artedukado en Nürnberg » eldonita de D-ro FRIEDRICH NÜCHTER. 95 p. 27 × 35 cm. Prezo: 2 Sm.; lukse bindita: 2,500 Sm.

La belega kajero, en formato de folio, enhavas: tekston, 54 tabulojn kaj bildojn (13 pentraĵojn de Dürer, 12 mandesegnaĵojn, 16 kuprogravuraĵojn, 12 lignoĝravuraĵojn, 1 koloran presaĵon).

Ni povas sincere danki kaj gratuli la eldoninton, kiu per tiu ĉi belega libro konigas al ni la faman germanan artiston mezepokan, la eminentan Nürnberg'an majstron Albrecht Dürer. — La tradukado estas farita de granda nombro de konataj esperantistoj de Germana Esperanto-Asocio sub direktado de D-ro M. Kandt kaj S-ino M. Hankel; S-ro Grabowski tralegis la tekston.

El la antaŭparolo de la libro ni elĉerpas la jenon: « Kio estas pli internacia ol pentrarto? Ĝi parolas per propra lingvo, komprenebla al ĉiuj kaj tial ŝajne ne bezonas ian helpilon por esti komprenata. Tamen ĝenerale niaj okuloj havigas al ni nur naiĝvan ĝojon pri la beleco de moderna pentraĵo. Se ni volas gajni pli profundan konon pri la arto kaj la artisto, ni nepre devas sciigi pri la vivo de l' pentristo, pri la lando, el kiu li ĉerpis sian forton, k. t. p. Speciale pentraĵoj el longe pasintaj artepokoj tre ofte ŝajnas al ni strangaj kaj tute ne belaj, kaj ni nur komprenas, kial ili entuziasmigis niajn antaŭulojn, se klariga teksto sciigas al ni ĉiujn momentojn, kiuj influis la pentriston: ne nur la naturo, sed ankaŭ la homoj, la tiamaj ideoj, k. t. p. Tial ankaŭ, rilate al pentrarto, Esperanto estas la ilo por tutmonda kompreniĝo, kaj ni ŝuldas grandan dankon al la eldonisto de tiu ĉi verko, ke li proponis al ni traduki la germanan tekston pri la vivo kaj la arto de unu el la plej famaj germanaj pentristoj, Albrecht Dürer... »

Ĉiu esperantisto certe salutas ĝoje la eldonadon de tiu verko kaj devus opini ĝin sia honora devo, helpi al la disvastigado de la belega arteldonaĵo, kiu tion plene meritas. Precipe ĝi taŭgas kiel Kristnaska kaj Novjara donaco, ĉar ĝi ne nur estas interesa verko, sed pro sia luksa beleco ĝi povas esti ornamo de ĉiu biblioteko.

La libro estas aĉetebla ankaŭ ĉe *Presa Esperantista Societo*, 33, rue Lacépède, Paris.

La organizado de la intelekta laboro per « La Ponto » estas la titolo de la alia, ankaŭ grava verko, kies aŭtoroj estas K. W. BÜHRER kaj AD. SAAGER; esperantigita de J. SCHMID, L. K. 158 p. 16 × 23 cm. Volumo bindita. Prezo: 2 Sm.

Malfacile estas konigi tiun ĉi instruon verkon en kelkaj linioj. La intelekta laboro, kiu estas jam pli malpli izole organizita, devas esti kunmetata, laŭ ĝiaj diversaj specoj kaj subspecoj, laŭ konvena plano. La ĉefaj vidpunktoj de ĉi tiu plano, sur la bazo de komuna interkonsento, sen specialaj oferoj de iu sola sed por la bono de ĉiuj, estas priskribitaj en tiu ĉi libro. Pro tio la libro havas plej grandan interreson, pro profesiaj kaj privataj motivoj por ĉiu. — La ĉefaj taskoj de la « Ponto » kuŝas en ĝia karaktero de ĉion ampleksanta *informejo*, kaj de ĉiujn fakojn de intelekta laboro ampleksanta *oficejo de organizado* por liberigi la intelektan laboron de la balasto de l' mekanika preparlaboro.

La verko, kiu konsistas el 12 ĉapitroj, portas la sekvantan de-

vizon (de Wilhelm Ostwald) : « La decidigan vorton por la bono de l' homaro hodiaŭ ne plu eldiras la elpensinto kaj eltrovinto, sed la *organizanto*. Pro tio la organizado de "La Ponto" estas la postulo de la nuna tempo. » — La libro estas agrabla kaj belaspekta.

Ankaŭ ĉi tiu verko estas mendebla ĉe Presa Esperantista Societo. 33, rue Lacépède, Paris.

Ni ne povas silenti ankaŭ pri la **Gvidfolio tra Ansbach** (Bavarujo). Bone redaktita kaj bele presita, kun ilustraĵoj, ĝi detale konigas la nomitan urbon. Senpage kaj afrankite ĝin sendas la librejo Fr. Seybold al ĉiuj, kiuj mendas ĝin per ilustrita poŝtkarto.

PEDAGOGIA FAKO

(Volente ni respondas al niaj abonantoj en tiu ĉi rubriko iliajn lingvajn demandojn komune interesajn.)

Ĉefurbestro. (Responde al S-ro L. M.) — Tiun vorton oni *ĝenerale* uzas en la senco de « ĉef-urbestro », t. e. la plej altranga el la estroj de iu urbo; kvankam ĝi tre bone povas esti uzata ankaŭ en la senco de « ĉefurbestro », t. e. (urb)estro de ĉefurbo. La frazo montras la ĝustan sencan, tiel, ke ne povas resti ia dubo pri ĝi.

Oni povas citi multajn similajn ekzemplojn, ĉe kiuj la senco *ŝajnas* nesufiĉe klara. — « Poŝtranĉilo » estas tranĉilo, kiun oni portas en la poŝo. Ĉu tiu vorto (poŝtranĉ-ilo) ne povas signifi: ilo por tranĉi la poŝon, t. e. specialan tranĉilon de poŝostelistoj?... — « Virĉevalido » ordinare signifas (vir-ĉevalido) nematuragan ĉevalon virseksan; sed ĝi tre bone povas signifi (virĉeval-ido) ankaŭ idon de iu difinita virĉevalo, ekz. muldon devenantan de virĉevalo kaj azenino (pri kiu oni do povas diri ankaŭ « azeninido »). — Aŭ: « vangofrapi » signifas: frapi la vangon de alia; « piedrapi »: frapi *iun per sia* piedo. — « Ĉevalŝtelisto » ŝteladas ĉevalojn; « poŝostelisto » ne ŝteladas poŝojn, sed diversajn objektojn *el* la poŝoj; « hotelŝtelisto » ŝteladas *en* la hoteloj, — « noktoŝtelisto » *dum* la noktoj, k. t. p.

Ne serĉu *matematikan precizecon* en vivanta lingvo; la ĉefa afero estas, ke ĝi estu logika kaj komprenebla. Esperanto ja estas tia; ĝia mirinda fleksebleco ne ĝenas, sed kontraŭe, multe helpas ĝian nekonfuzeblan klarecon.

Naztuko aŭ poŝtuko? (Responde al tiu sama.) — Ambaŭ formoj estas uzataj en Esperanto; ambaŭ estas bonaj. Tamen el la du vortoj « poŝtuko » ŝajnas al mi pli bona ol « naztuko », ĉar tiu tuko estas portata en la *poŝo*, — kaj ĝi servas ne nur por purigi la nazon, sed ankaŭ por aliaj celoj, ekz. forviŝi ŝvitajon, polvon aŭ alian makulon, k. t. p.; aliparte, la esprimo « naztuko » pensigas al maldelikataĵo iom trivialeta kaj iafaje eble povas ofendi trosentemajn orelojn. Cetere, ekzistas naciaj lingvoj, en kiuj ĝi estas nomata *poŝtuko*: *germane* Taschentuch (Tasche *poŝo*, Tuch *tuko*), — *hungare* zsebkendő (zseb *poŝo*, kendo *tuko*).

P. DE L.

HUMORAĴOJ

La funebro. — *Petro* : Vidu, Paŭlo, tie venas Josefo Brumm. — *Paŭlo* : Ne, li ne povas esti Josefo Brumm; li ja mortis antaŭ unu monato. — *Petro* : Jes, vere; sekve, se tiu venanto estus Josefo Brumm, li nepre estus funebre vestita.

Konkludo. — Sesjara Toto al sia kamarado, kiu estas negro : « Diru, kolegeto, ĉu ne vere, en via lando la negro estas nigra ? »

La mortkondamno. — La tribunalestro demandas la kulpigiton : — Ĉu vi estis jam kondamnita ?

— Jes, mi estis jam kondamnita; sed mi feliĉe evitis la punon.

— Kiam? al kio?

— En mia junaĝo, al morto.

— De kiu tribunalo?

— Ne de tribunalo, sed de kuracisto.

Neble. — *Etulo* : Paĉjo! paĉjo! vespo estas sur la plafono. — *Patro* (distrite) : Surpaŝu ĝin kaj lasu min trankvila.

Farto. — *A* : Pli bonfartanta ol mi? sed vi estas malgrasa, maldika, kiel najlo. — *B* : Nu, ĝuste tial : mi ĝuas sanon fortikan kiel fero.

Malhelpo. — (En teatro) « Ĉu ci alportis cian lorneton, amikino? » — « Jes, sed mi ne povas ĝin uzi. » — « Kial? » — « Mi forgesis miajn braceletojn. »

Pesimismo. — « Tial vi enuas ĉiam, ĉar vi ne ŝanĝadas viajn distriĝojn. » — « Ha! ne parolu; ŝanĝadi la distriĝojn estas : ŝanĝadi la enuojn. »

Kompetentulo. — « Vi parolas al mi pri aviado? al mi?... Ho, mi tre bone konas la flugarton! mi estas impost-enspezisto. »

Ironio. — *Malliberulo* : Se mi pripensas, ke oni min nur tial alportis ĉi tien, ĉar mi manifestis por la libereco....

Kapdoloro. — *Pantofloviĉ* : Sinjoro kuracisto, la malmolkurita ovo kaŭzas al mi kapdoloron. — *Kuracisto* : Do, ne manĝu ĝin. — *Pantofloviĉ* : Mi ja ne manĝis ĝin, sed mia edzino ĵetis ĝin al mia kapo.

Deflankiga motivo. — *La strata atak-rabisto* : Mi pripensis... mi ne atakos tiun burĝon; tio kaŭzus al mi riproĉojn de mia konscienco. Kaj ŝajnas ankaŭ, ke li havas ŝargitan revolveron en sia poŝo.

Justeco. — *La edzino* : Kara edzo, mia amikino Lina aĉetigis por si per siĝ edzo tian ĉirkaŭmanon, kian mi havas. Estas do juste, ke nun vi aĉetu por mi tian ĉirkaŭkolon, kian ŝi havas.

Eĉ... — *A* : Ĉu vi bruligis mian leteron post la lego? — *B* : Eĉ antaŭ la lego.

La kaŭzo. — *Paciento* : Sinjoro kuracisto, ŝajnas al mi, ke mi estas atakita de malsano de trodormado. — *Kuracisto* : Vi eble longe estadis en iu sudlanda kolonio? — *Paciento* : Ne; mi estas oficisto ĉe la ministerio por publikaj laboroj.

Kontentiga aranĝo. — Policano disigas du interbatantajn bubojn sur la strato.

— Sinjoro policano, — diras la unua bubo, — Alberto donis al mi du vangofrapojn.

— Kaj Norberto, — diras nun la alia, — donis al mi tri.

La policano: Bone. Do vi, Norberto, donos ankoraŭ du vangofrapojn al Alberto, kaj li donos al vi tri; poste repaciĝu, ĉar ĉio estos juste aranĝita.

Bona heredaĵo. — « Mia onklo Petro ĵus mortis; mi heredos. » — « Heredos? kiel? via onklo Petro ja estis tute malriĉega. » — « Jes, tamen mi heredos ĉiumonatan renton de 25 Sm., ĉar tian sumon mi pagadis al li ĉiumonate, al la kompatinda mizerulo. »

Superkapajo. — *Edzo*: Denove nova ĉapelo?! tio estas vere tro da elspezigo! tio superas eĉ mian kapon... — *Edzino*: Ankaŭ la mian.

Trafa respondo. — Du laboristoj, en la laborejo, kartludas dum la labortempo. Sed jen alvenas la mastro neatendite; furioze li krias:

— Ha! kia senhonta maltimo! Ludi kartojn anstataŭ labori! Ĉu por tio mi pagas al vi?...

Unu el la laboristoj: Ne, sinjoro; ni kartludas senpage.

Ĉe vilaĝa barbiro. — *Kliento*: Ve! ve! He, mastro, vidu! via razisto fortranĉis pecon de mia orelo! — *Barbiro* (tranĉvile): Des pli bone, sinjoro; ĝi ja estis tre longa.

NIAJ KONKURSOJ

Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 \$, — 2) samon en valoro de 1 \$, — laŭ elekto de la premioj.

Novan konkurson ni malfermos en nia venonta numero.

KOREKTO. — Ni presis en nia lasta nomaro de partoprenintoj la nomon Tomka; ĝi devas esti legata *Tanka*. Ni uzas tiun okazon por peti niajn korespondantojn, ke ili bonvolu skribi *tre legeble*, precipe la proprajn nomojn.

Korespondado de la Redakcio.

R. H. (M.) — Vian leteron kaj manuskripton ni transdonis al S-ro F. — Saluton!

Pri la vorto « Esperanto ». — Nek publike, nek private ni respondas leterojn, kies sendinto ne sciigas al ni sian veran nomon.

Justulo. — La ĵusa dulinio estas adresita ankaŭ al vi.

F-ino S. Th. — 1) Ni ne scias, kiu estas ĝia aŭtoro. — 2) Jes, Presa Esp. Soc. akceptas mendojn pri ĉiaj Esperantaĵoj.

